

Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko (CDELI)

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.03.13.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-165/Radiokasedo-165-86-6-A-1027-Claude-kaj-Andree-GACOND-Bibliografio-de-Esperanto-kaj-Interlingvistiko-CDELI.mp3>

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Intemacia.

La pasintan jaron Universala Esperanto-Asocio registris en sian labor-programon por la centjara jubileo de esperanto la bibliografian projekton de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri Lingvo Intemacia, la interlingvistika fako de la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- Estas konate, ke CDELI, kiu estis fondita en 1967, rapide fariĝis unu el la plej riĉaj interlingvistikaj bibliotekoj, tio ĉi dankal sia neŭtraleco kaj laborobjektiveco. Ne nur esperanto-pioniroj heredigis al ĝi sian dokumentaron, sed ankaŭ adeptoj de aliaj planlingvoj, kiel. Ido, Occidental, Interlingua. Pro tiu interlingvistika ekumenismo CDELI ludas tre gravan rolon, des pli ke ĝi posedas tre bone redaktitan sliparon. Pli kaj pli la fakuloj alvokis, por ke ĝi akceptu transpreni la taskon redakti la tiom mankantan bibliografion de esperanto kaj interlingvistiko.

Cl.- Kiel oni povas imagi, la redaktado de la menciita bibliografio ne estas eta afero. Siatempe UEA jam lanĉis unuan agadon dankal la subvencia helpo de sinjorino Morris, kaj la rezulto estas la fundamenta verko "Bibliografio de Intemacia Lingvo", kiun kompilis kaj komentaris Petro Stojan. Ĝi aperis en 1929 kaj estis reeldonita 1973 de eldonejo Georg Olms Verlag, kies sidejoj estas en Hildesheim (Germanio federacia) kaj Nov-jorko (Usono).

A.- Baldaŭ sesdek jaroj disvolviĝis, ekde la apero de tiu fundamenta verko, kaj pli kaj pli sentiĝas la manko de kompletiga verko. Tial CDELI akceptis organizi sian laboron, en kunlaboro kun la Intemacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, por transpreni la taskon pretigi kaj eldoni en formo de jaraj kajeroj la mankantan bibliografion.

Cl.- En januaro ĉijara ĉiuj esperanto-eldonejoj kaj redakcioj ricevis informilon, kiu anoncis, ke CDELI transprenis la taskon pretigi kaj eldoni la bibliografion de esperanto kaj interlingvistiko. Jen hodiaŭ ni laŭtleĝas al vi tiun tre gravan informilon:

A.- Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko
(Auspiciita de Svisa Nacia Komisiono por UNESKO)
Centro de Dokumentado kaj Esploro pri Lingvo Internacia (=CDELI)
Biblioteko de la Urbo, LA CHAUX-DE-FONDS

Prijuĝoj de la fakuloj: CDELI estas verŝajne la plej taŭge ekipita interlingvistika dokumentejo por eldoni la tiom atendatan verkon "Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko", sub formo de jar-kajeroj. Tion unuanime asertas la fakuloj ĝin vizitantaj (instruistoj, esplorantoj, redaktoroj, arkivistoj, gvidantoj de la esperanto-movado, ktp). Tial ĉiuj pli kaj pli vigle insistas, por ke CDELI aldonu al siaj servoj tiun de redaktado de la mankanta bibliografio. Marinko Gjivoje, en sia "Konsultlibro pri Esperantaj Bibliotekoj kaj Muzeoj" (Zagreb, 1980), ne nur registris la arkivejon CDELI inter la plej riĉe provizitaj centroj de interlingvistika dokumentaro en la mondo. Li plie atentigas, ke

la apartigo de tiu arkivejo interne de la ĝin ŝirmanta Biblioteko kaj ekzisto de tre preciza sliparo faras de CDELI imitindan modelon.

Cl.- Disvolviĝo de CDELI: Tiuj prijuĝoj kuraĝigis la aŭtoritatojn de la urbo La Chaux-de-Fonds akceli la disvolviĝon de CDELI, por ke ĝi kapablu ekstarti koncerne la pretigon kaj eldonon de la dezirata bibliografio. Tiel, ekde 1983, la CDELI-bibliotekisto povas dediĉi kvarfoje pli da tempo al la libro- kaj arkivo-katalogado, dokumentaro daŭre kreskanta. Krome decidiĝis eldonplano por la publikigo de bibliografio.

A.- Unua kajero en 1986

La unua kajero de "Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko" eldoniĝos antaŭ la centjara jubileo de esperanto. Ĝi aperos aŭtune de 1986 kaj listiĝos en ĝi la eldonaĵoj de 1984: libroj, revuoj, artikoloj, broŝuroj kaj diversaj. Ekde tiam eldoniĝos ĉiuaŭtune nova bibliografia kajero rilate al la antaŭaj jaroj. Tiu ĉi agado enskribiĝas en la porjubilea projekto aŭspiciata de UEA.

Cl.- CDELI alvokas

Por ke tiuj kajeroj estu bibliografie kompletaj, gravegas, ke CDELI ricevu aktivan apogon de la libro- kaj revuo-eldonistoj, de la esperanto-organizaĵoj kaj de la interlingvistikaj medioj, de la ĵurnalistaro, de la sciencistoj, de la produktantoj de kasedoj kaj diskoj, de la organizantoj de kongresoj, kolokvoj, renkontiĝoj kaj kursoj, de la klub- kaj grup- gvidantoj, ktp. Estu sendata al CDELI por registriĝo specimena ekzemplero de ĉio aperinta en kaj pri esperanto, en kaj pri ĉia alia planlingvo, kaj koncerne interlingvistikon. CDELI, kiel la ceteraj bibliografiaj centroj, povas registri nur ricevitaĵojn.

A.- Katalogo de la CDELI-dokumentaro: Publikiĝos katalogo de la CDELI-dokumentaro, kiam la necesa monsumo estos rikoltita. Tiu katalogo estos komenco de Ĝenerala Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko. Sed antaŭe la dokumentaro mem de CDELI devas esti kompletigita. CDELI jam antaŭdankas al la eldonistoj, organizaĵoj kaj arkiv- posedantoj, kiuj donacos mankantajn erojn.

Cl.- La Chaux-de-Fonds, januaro 1986

Nome de CDELI: la direktoro de la biblioteko: Fernand DONZE; la prezidanto de la CDELI-Komitato: D-ro Tazio CARLEVARO; la bibliotekisto: Pierre-Yves TISSOT; la arkivisto: Claude GACOND; la bibliografia kunlaboranto: Stefano KELLER.

A.- Post la laŭtleĝo de tiu grava informilo ni menciis, ke karakterizaĵo de CDELI estas ke la libroj kaj revuoj, kiuj troviĝas en troa stoko, eniras brokantan servon, kiu antaŭ ĉio servas al interŝanĝo de dokumentoj kun la aliaj bibliotekoj, al la riĉigo de novaj esperanto-bibliotekoj. Ankaŭ kolektantoj utiligas tiun ĉi servon por riĉigi siajn kolektojn kaj provi riĉigi tiujn de CDELI mem. Tiu brokanta servo estas fundamento al interlingvistika kunlaboro.

Cl.- Ni konkludas nian hodiaŭan raporton legante alvokon, kiun CDELI sendis al ĉiuj redakcioj de ĉiuj esperanto-gazetoj. Ĝi diras :

A.- Kunlaboru al la pretigo de kiel eble plej kompleta Bibliografio de Esperanto per la sendo de specimena ekzemplero de ĉiuj viaj eldonaĵoj : libroj, gazetoj, grupinformiloj, raportoj,

kongresaĵoj, reklamiloj kaj tiel plu. Adreso: CDELI, Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko, Biblioteko de la Urbo, Poŝtfako 5038, CH-2300 LA CHAUX-DE-FONDS 5, Svislando.

Cl.- Ni aldonu, ke eĉ se la adreso ne estas tute kompleta, la poŝtoj tamen transdonas la dokumentojn al la Biblioteko aŭ al Kultura Centro Esperantista, kiu siavice transdonas ilin al CDELI.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*